

## LA UNIVERSALA DOMO DE JUSTECO

Oktobro 2017

Al ĉiuj, kiuj celebras la Gloron de Dio

Elkore amataj geamikoj,

tiun ĉi benodonan veron asertas ni: ke la popolojn de la tero ĉiam memoris ilia Dio. En ĉiu historia erao tiu nekonebla Realeco malfermis la pordojn de l' graco al la mondo per la sendado de Reprezentanto taskita liveri la moralan kaj spiritan stimuladon, kiujn homaj estaĵoj bezonas por kooperadi kaj avanci. Multaj el la nomoj de tiuj ĉi grandaj Lumoj por la homaro perdiĝis. Sed kelkaj brilas el la kronikoj de l' pasinteco kiel esti revoluciintaj la pensadon, liberigintaj amasajn sciojn kaj inspirintaj la disvolviĝon de civilizacioj – kaj Iliaj nomoj estas daŭre honorigataj kaj laŭdataj. Ĉiuj el tiuj spiritaj kaj sociaj viziuloj, senmakulaj speguloj de l' virto, prezentis instruojn kaj verojn kiuj respondis al la urĝaj bezonoj de la tiutempo. Kun la mondo nune frontanta siajn plej premajn defiojn iam, ni aklamas Bahá'u'lláh-n, naskiĝinta antaŭ ducent jaroj, kiel tian Figuron – fakte kiel Tiun, Kies instruoj kondukos al tiu longe promesita tempo kiam la tuta homaro vivos unu apud la alia en paco kaj unueco.

Ek de Sia frua juneco Bahá'u'lláh estis de tiuj kiuj Lin konis vidata kiel Iu portanta la signon de l' destino. Benita per sanktula karaktero kaj eksterordinara saĝo ŝajnis Li esti tuŝita de la bonvola lumo de l' ĉiel'. Li tamen devis elteni kvardek jarojn da suferado, inkluzive de sinsekvaj ekziloj kaj enkarcerigoj je la ordono de du despotaj monarkoj, kampanjojn por kalumnii Lian nomon kaj kondamni Liajn adeptojn, violentojn kontraŭ Lia persono, hontindajn atencojn je Lia vivo – ĉion tion Li, pro senlima amo por la homaro, vole eltenadis serene kaj indulge kaj kun kompatato por Siaj turmentantoj. Eĉ konfisko de ĉiuj Liaj materiaj posedaĵoj ne povis Lin perturbi. Oberservanto eble miras kial Iun, Kiu tiel komplete amis aliajn, trafis tia malamo – konsiderante ke aliflanke Li estis ĝenerale aprezata kaj admirata, famiĝinta pro Sia bonvolemo kaj nobleco, kaj estis forneinta ajnan pretendon je politika potenco. Por ĉiu familiara kun la ripetaj vojoj de l' historio estas la kialo por Liaj afliktoj kompreneble evidenta. La apero de profeta Figuro en la mondo senvarie levis ferocan oponadon de la potenculoj. Sed la lumon de l' vero ne eblas estingi. Kaj tiel en la vivoj de tiuj transcendantaj Estaĵoj trovas oni sinoferon, heroecon kaj, kio ajn okazas, agojn ekzemplantajn Iliajn vortojn. La samo evidentas en ĉiu fazo de la vivo de Bahá'u'lláh. Spite ĉiun suferadon estis Li neniam silentigita, kaj retenis Liaj vortoj sian persvadan potencon – vortoj eldiritaj per la voĉo de l' kompreno, diagnozantaj la malsanojn de la mondo kaj preskribantaj la medikamenton; vortoj portantaj la pezon de l' justeco, avertantaj reĝojn kaj regantojn pri la fortoj kiuj fine forbalas ilin desur siaj tronoj; vortoj kiuj lasas onies animon levita, admireganta kaj transformita, decidema liberigi sin el la dornoj kaj veproj de l' egoo; kaj vortoj kiuj estas klaraj, konvinkaj kaj emfazaj: »Tio ĉi ne estas de Mi, sed de Dio.« Ĉu ne emas oni, konsiderante tian vivon, demandi: se tio ĉi ne estas de Dio, kio do troveblas ke estas?

La perfektaj Edukantoj, Kiuj tra la historio alportis lumon al la mondo, lasis legacion de sanktaj vortoj. Inter la vortoj, kiuj rivero fluis el la plumo de Bahá'u'lláh estas donacoj de enorma rango kaj sublimes karaktero. Ne malofte iu konatiĝanta kun Lia Revelacio reagis unue al preĝoj supere belaj, kiuj kontentigas la sopiron de la animo dece adori sian Kreinton. Pli profunde en la oceano de Liaj vortoj malkovreblas la leĝoj kaj moralaj imperativoj por liberigi la homan spiriton el la tiraneco de mondaj instinktoj ne indaj por lia vera destino. Tie ankaŭ troviĝas daŭraj idealoj en kies lumo gepatroj povas kreskigi siajn infanojn ne nur simple simile al si mem, sed kun aspirado pli noblaj. Ankaŭ estas klarigoj, kiuj rivelas la manon de Dio agantan tra la historio de la kurba vojaĝo de la homaro tra la stadioj de tribo kaj nacio al pli altaj formoj de unueco. La diversaj religioj de la

mondo estas prezentataj kiel esprimoj de unusola fundamenta vero, ligitaj inter si per komuna origino kaj ankaŭ per komuna celo: transformi la internan vivon kaj la eksterajn kondiĉojn de la homaro. La instruoj de Bahá'u'lláh atestas pri la nobleco de la homa spirito. La socio viziita de Li estas ia inda je tiu nobleco kaj baziĝanta sur principoj, kiuj gardas kaj fortigas ĝin. La unuecon de la homa familio Li metas en la centron de la kolektiva vivo; la egaleco de virinoj kaj viroj Li sendubasence asertas. Li repacigas la ŝajne kontraŭiĝantajn fortojn de nia propra epoko – sciencon kaj religion, unuecon kaj diversecon, liberecon kaj ordon, individuajn rajtojn kaj sociajn responsojn. Kaj inter Liaj plej grandaj donacoj estas justeco, manifesta en institucioj, kies zorgo estas la progreso kaj evoluo de ĉiuj popoloj. Laŭ Liaj propraj vortoj Li »eliminis de la paĝoj de la sankta Libro de Dio ĉion ajn kio estis la kaŭzo de konflikto, de malico kaj malboneco inter la homaj idoj« kaj samtempe »elmetis la esencajn antaŭkondiĉojn de konkordo, de interkompreniĝo, de kompleta kaj daŭra unueco«. Ĉu ne oni sin demandu, kio do estas deca reago al tiaj donacoj?

»Estas la devo de ĉiu serĉanto vigliĝi kaj strebi la bordojn de tiu ĉi oceano atingi«, diras Bahá'u'lláh. La spirita instruoj alportitaj tra la epokoj pere de sinsekvaj Mesaĝistoj esprimiĝis per religiaj sistemoj, kiuj, kun la tempopaso, fandiĝis kun kulturaj aspektoj kaj peziĝis per homfaritaj dogmoj. Sed se oni rigardas preter tiuj evidentiĝas ke la originaj instruoj estas la fonto de la universalaj valoroj pere de kiuj diversaj popoloj trovis komunecon kaj kiuj formis la moralan konscion de la homaro. En la nuntempa socio multe suferis la reputacio de la religio kaj kompreneblas ke tiel estas. Se nome de la religio oni instigas al malamo kaj konflikto pli bonas seniĝi je ĝi. Tamen, vera religio rekoneblas per siaj fruktoj – per ĝia kapablo inspiri, transformi, unuigi, nutri pacon kaj prosperon. Ĝi akordiĝas kun racia pensado. Kaj ĝi estas esenca por socia progreso. La Kredo de Bahá'u'lláh kultivas ene de la individuo kaj de la komunumo la disciplinon agi surbaze de pripensado; kaj pere de tio iom post iom akumuliĝas ekkonoj pri efikaj vojoj de laborado por la plibonigo de la socio. Bahá'u'lláh kondamnas provojn atingi sociajn ŝanĝojn pere de politikaj intrigoj, ribeloj, kalumnii specifajn grupojn, aŭ aperta konflikto, ĉar tiuj nur kontinuas ciklojn da batalado dum daŭremaj solvoj plue eskapas. Li pledas por rimedoj tre alispecaj. Li alvokas je bonfaroj, afablaj vortoj kaj honesta konduto; Li devontigas al servado por aliaj kaj kunlaborado. Kaj al la tasko konstrui mondan civilizacion baziĝanta sur la diaj instruoj vokas Li ĉiun membron de la homa raso. Ĉu oni ne, kontemplanter la vastecon de Lia vizio, sin demandu, surbaze de kiu fundamento povas la homaro realece generi esperon por la estonteco, se ne sur tiu ĉi?

En ĉiu lando tiuj altiritaj al la mesaĝo de Bahá'u'lláh kaj sindevigantaj al Lia vizio sisteme lernas kiel efektiviĝi Liajn instruojn. Kohortoj da junuloj ĉiam pli konsciiĝas pri sia spirita identeco kaj direktas sian energion al la avanco de siaj socioj. Homoj kun diverĝaj perspektivoj malkovras kiel anstataŭigi kontraŭstaron kaj la trudon de aŭtoritato per interkonsiliĝo kaj kolektiva serĉado de solvoj. El ĉiu raso, religio, nacio kaj klaso unuigiĝas animoj ĉirkaŭ vizio de la homaro kiel unu popolo kaj la tero kiel unu lando. Multaj longe suferintaj trovas sian voĉon kaj fariĝas protagonistoj de sia propra evoluo, eltroveme kaj elteneme. El vilaĝoj, kvartaloj, urbetoj kaj urbegoj leviĝas institucioj, komunumoj kaj individuoj sindediĉiĝantaj kune labori por la ekaperado de unuigita kaj prosperanta mondo, kiu vere meritas esti nomata la regno de Dio sur tero. Je tiu ĉi ducentjariĝo de la apero de Bahá'u'lláh la multaj, kiuj partoprenas en tiu ĉi entrepreno, etendas la manon al tiuj ĉirkaŭ si kun simpla invito: Ekkaptu tiun ĉi okazon por eltrovi kiu estis Li kaj kion reprezentas Li. Testu la kuracilon preskribitan de Li. Lia veno ofertas nepran pruvon ke la homa raso, minacata de multnombraj danĝeroj, ne estas forgesita. Kiam tiel multe da bonvolemaj homoj tra la mondo tiel longe petegis Dion reagi al la problemoj kiuj ilin ĉirkaŭas en ilia komuna hejmlando, ĉu estas tiel surprize ke Li eble respondis ilian preĝon?

[signita: La Universala Domo de Justeco]